## Presserückblick 2006

### Bi-kulturell geprägte Mitarbeiter als Trumpfkarte

In der Ausgabe 11/2006 der „Südwestfälische Wirtschaft“ schreibt Dr. Jürgen Alberts unter dem Titel „Bi-kulturell geprägte Mitarbeiter als Trumpfkarte“: „... Die Chancen des europäischen Binnenmarktes und des Weltmarktes lassen sich im harten Konkurrenzkampf jedoch nur mit entsprechenden Sprach- und Kulturkenntnissen ausschöpfen. Denn: Wo Zollgrenzen wegfallen, werden mangelnde Sprachfertigkeiten zu entscheidenden Wettbewerbsbarrieren. ...“
Deutsche Arbeitnehmer würden demnach schlecht dastehen. Nur knapp 40 Prozent würden eine Fremdsprache „gebrauchsfähig“ sprechen, nur sieben Prozent zwei oder mehr Sprachen. Alberts sieht besonders gute Chancen für „bi-kulturell geprägte Menschen“. Er meint damit die Nachkommen der so genannten Gastarbeiter, die oft nicht nur zwei Sprachen sprechen, sondern auch zwei Kulturen kennen.

**Kommentar**
Dass bi-kulturelle Prägung schon ein Trumpf ist und Mehrsprachigkeit die Chancen im Berufsleben verbessert werden viele „denaskuloj“ gerne hören. Schließlich wachsen etliche von ihnen in drei Kulturen – der beiden Kulturen ihrer Eltern und der internationalen Kultur des Esperanto-Gedankens – auf und bringen auch gleich die drei dazugehörigen Sprachen mit.
*Alfred Schubert*

### „Chinesen machen den Deutsch-Test“

Unter diesem Titel berichtet die Westfälische Rundschau in ihrer Ausgabe vom 20.11.2006, dass sich die Zahl der Chinesen, die mit dem Test „Deutsch als Fremdsprache“ ihre Deutschkenntnisse nachweisen, von 2003 bis 2006 auf 1507 fast verdreifacht hat.
Weltweit haben dem Bericht zufolge im vergangenen Jahr fast 14000 Studierende den Test gamacht. Dies entspreche einer Steigerung von 25 Prozent gegenüber der Zahl von 2005.

### „Moderner Akzent“

Als „modernen Akzent in einer barocken Stadt“ bezeichnet Oliver Gerhard das Viersternerhotel „Esperanto“ in Fulda in einem Artikel, der unter dem Titel „Badeluxus in der Bischofsstadt“ in der Ausgabe 10/2006 der Zeitschrift „mobil“ veröffentlicht wurde. Den Artikel ziert ein halbseitiges Farbfoto der Hotelfassade mit dem Schriftzug „ESPERANTO“.

### „Vatersprache“

Unter dem Titel „Väter prägen die Muttersprache“ berichtet der „Wochen Blick Ennepe Süd“ in seiner Ausgabe vom 7. Dezember 2006, dass Forscher der Universität von North Carolina (USA) „mit dem verbreiteten Vorurteil aufgeräumt“ hätten, „die Muttersprache werde vor allem durch die weibliche Bezugsperson geprägt.“
Untersuchungen der Universität hätten ergeben, dass Kinder den Satzbau von Männern imitierten. Die an der Untersuchung beteiligte Forscherin Lynne Vernon-Feagans vermute, dass Frauen Kleinstkinder mit zu vielen Worten überforderten.

### „Verständigung über die Grenzen hinweg“

Im Ende 2006 erschienenen Branchenbuch „Branchen VorOrt im Kreis EN“ für 2007 wurde unter dem Titel „Verständigung über die Grenzen hinweg“ die Esperanto-Gruppe Schwelm vorgestellt.

### Spielerisch Deutsch lernen

Unter dem Titel „Kauf dich ein Karton Deutsch“ stellt die Westfälische Rundschau in ihrer Ausgabe vom 17. November 2006 ein Spiel zum Deutschlernen vor. Das Spiel heißt „Der Dativ ist dem Genitiv sein Tod“ und stammt von Bastian Sick, dem Autor des gleichnamigen Buches. Es ist für Spieler ab zwölf Jahren geeignet, mitspielen können zwei bis fünf Personen. Die Spielregeln sind übersichtlich: Ein Spieler liest wahlweise einen richtigen oder einen falschen Satz vor, die anderen entscheiden, ob der Satz stimmt oder nicht.
Zu ernst nehmen sollten die Teilnehmer das Spiel, das sie auch vor kniffllige Fragen stellt, aber nicht. Sonst platzen ihnen am Ende noch die Krägen – oder: die Kragen. Oder ...?

### Schock an Schulen

„Schock deine Lehrer – lies ein Buch!“ Unter diesem Motto versuchte im vergangenen Jahr das Kultusministerium von Nordrhein-Westfalen, Schüler zum Lesen zu motivieren.

### „Niederländisch ist Pflicht“

Unter diesem Titel berichtet die Westfalenpost in ihrer Ausgabe vom 31. August 2006, dass „auf den Pausenhöfen aller Schulen der belgischen Gemeinde Merchtem bei Brüssel vom neuen Schuljahr an nur noch Niederländisch gesprochen werden“ darf. Wer eine andere Sprache spreche sollte laut Bürgermeister De Block zurechtgewiesen werden. Auch alle Kontakte mit Eltern sollten auf Niederländisch verlaufen.

### „Mit Esperanto um die Welt“

Die „Weite Welt“, das Jugendmagazin der Steyler Missionare, veröffentlichte in seiner Ausgabe Juli/August 2006 einen zweiseitigen Beitrag über Esperanto. Der Artikel steht auf den Seiten kvardek du und kvardek tri. Die – ausgeschriebenen – Seitenzahlen wurden nämlich ebenfalls in der internationalen Sprache abgedruckt.

### Englisch auf dem Klo

Das israelische Restaurant „Schmock“ bietet seien Gästen einen ganz besonderen Service. Sie können Englisch lernen – und zwar auf dem Klo. Dies berichtete die „Westfalenpost“ in ihrer Ausgabe vom 20. November 2006. In der Toilette des Schwabinger Restaurants erklinge ein Englischkursus über Lautsprecher.

## El la estraro de
Germana Esperanto-Asocio

Kutime la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) multajn malgrandajn aferojn traktas kaj decidas korespondante en la reto. Sed foje rekta buŝa interŝanĝo de opinioj estas grava, por klarigi pli komplikajn problemojn. Kiel anoncite, la GEA-estraro sekvis la inviton de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), veni al ties jubilea aranĝo, nome al la 50a Internacia Seminario (IS) (vidu apartan artikolon) en la kastelo Wewelsburg ĉe Paderborn. La 28an de decembro do ses estraranoj (mankis Alois Eder kaj d-ro Rainer Kurz) konferencis, unue kun la GEJ-estraro kune.

**Membroadministrado**

Jörg Gersonde deklaris, plufari la membro-administradon. GEA celas transpreni la datumbankan sistemon de GEJ, por kio necesos kelkaj adaptoj kaj la proceduro transporti la datumojn en la novan sistemon. Fine ĉiu elektita GEA-postenulo rajtu vidi la datumojn ĉe si hejme, ĉar ili estos sur centra servilo, dum nur tre malmultaj havos la rajton, ankaŭ ŝanĝi ion. Fine la datum-interŝanĝo kun la administra sistemo de GEJ estos pli facila kaj helpos, teni la membrojn en GEA.

**Varbado / publika laboro**

Propono, organizi standon fine de februaro en la foiro „didacta“, ne trovis konsenton. Spertintoj raportis, ke lastfoje venis nur lernejanoj sen intereso kaj arogantaj instruistoj. Por tio la elspezoj de ĉ. 2.000 EUR povos esti aliloke pli bone investataj. Estas pli sukcespromese, koncentri sin al unuopaj lernejoj kaj instruistoj, kion la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj alstrebas kaj kio jam okazas sukcese en Herzberg, la Esperanto-urbo.
Andreas Emmerich kaj Sebastian Kirf verkis la malneton de tekstoj por la planataj novaj varbaj faldfolioj. Entute estos sep, kaj ili havas diversajn cel-(grup)ojn. Krom baza (1) informilo ekzistu alia kun (2) la uz-ebloj de Esperanto. Tria turnos sin al (3) vojaĝemuloj, kvara prezentos la (4) Esperanto-kulturon. Du pliaj klarigas la lingvan strukturon, unu (5) en pli simpla lingvo, alia (6) en pli faka lingvo. La lasta pritraktu la temon (7) lingvopolitiko. Per tiu fasko da temoj GEA volas veki la intereson de homoj kun diversaj interesoj kaj individue alparoli ilin.
Kadre de la Printempa Semajno Internacia (PSI) en Bonn okazos kampanjo por novaj GEJ-membroj sub-18-jaraj; gvidos Leo Sakaguchi. Tio estos plia kunlaboro inter GEA kaj GEJ.

**Esperanto-Centro Herzberg**

Ekde la 1a de novembro laboras tie por tri monatoj kiel volontulo Dirk Bindmann, kiu sendis detalan raporton al la estrarkunsido. GEA promesis, dum tiu tempo pagi la elspezojn. Ekde januaro Herzberg dungis proprakoste jam plian helpanton.

**Pri nova GEA-oficejo en Berlino**



Paul Ebermann, sekretario de GEJ, kiu ankaŭ multe faras por GEA en Berlin.
Foto: Rudolf Fischer

GEA intencas, pli intense esti reprezentata en Berlin. Momente tie nur ekzistas leterkesto en la domo en Einbecker Straße. Paul Ebermann zorgas dankinde por la malmulta paperpoŝto respondenda. Sed GEA ŝatus havi tutan oficejon apud tiu de GEJ kaj por tio ankaŭ serĉas plian dungiton. Nur per novaj homfortoj kaj organizaj kapabloj valoras, organizi pli vastajn varbokampanjojn; ĉar kiom utilas provokitaj kelkcent informpetoj, se ne ekzistas la eblo respondi ilin? Momente tamen tiuj planoj devas esti prokrastitaj, ĉar unue la domo devos esti finpreparita (vidu apartan artikolon).

**Kontrakto kun Ukraina Societo „Espero“**

GEA subskribis kontrakton kun la Ukraina Societo „Espero“, gvidata de Mikaelo Lineckij. La lasta estas jam bone konata, daŭre zorgante por tio, ke Esperantistaj junulaj kaj infanaj grupoj el Ukrainujo vizitas Germanajn aranĝojn, precipe PSIon. La kontrakto oficialigu kaj tiel subtenu la reciprokan kunlaboron.

**Novaj kandidatoj por la GEA-estraro**

Ĝojiga novaĵo estas, ke dum la Germana Esperanto-Kongreso en Hamburgo prezentos sin du novaj kandidatoj por la GEA-estraro. La unua estas Wolfgang Bohr, kiu dum multaj jaroj gvidis la organizan teamon por PSI kaj kiu estas ankaŭ jam prezidanto de la landa ligo de Rejnlando-Palatinato. Li transprenos la taskon, plivigligi kaj inviti la konsilantaron. La dua estas Sebastian Kirf (vidu supre), kiu zorgos por inform-materialo. Ili prezentos sin ambaŭ en la sekvanta eldono de *Esperanto aktuell*. Samtempe Alois Eder retiriĝos el la estraro por koncentri sin al la Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo kaj al Esperantaj artikoloj en la Vikipedio. Carsten Mischke deklaris sin preta, zorgi kiel komisiito dum la Germana Esperanto-Kongreso por la amaskomunikila laboro.

**Ŝanĝoj en la GEJ-estraro**

Dum la membrokunveno de GEJ en Wewelsburg okazis ankaŭ estraraj elektoj. Andreas Diemel restis prezidanto, Anna Posingies trezoristo, Paul Ebermann sekretario. De Anna-Laura Wickström transprenis Julia Hell la fakon „internaciaj rilatoj“. Anstataŭ Julia Noe zorgos nun Leo Sakaguchi por la lokaj grupoj kaj ankaŭ por la kampanjo „Sub_18“ (vidu supre). Por Martin Sawitzki, kiu gvidis la organizan teamon de IS eĉ troviĝis sperta posteulo el Britujo, nome Rolf Fantom. GEJ ankaŭ havas novan komisiiton por sia revuo „kune“: estas Luisa Rund, kiu transprenis la postenon de Stefanie Hanisch.

*Rudolf Fischer*

## La landaj nomoj
kaj la Fundamento

de Dirk Willkommen

Jam delonge mi ne plu vidis tion: grupon da pacamaj Esperantistoj, rigardante unu la alian per flamaj okuloj, svingante la manojn argumente, simbole trapikante la alian per pintaj fingroj. Ankaŭ la diskutado pri la geografiaj nomoj ne plu povas igi la karajn amikojn tiel draste demonstri, ke Esperanto por ili estas vera korafero, feliĉe tamen. Unu kaŭzo de tia engaĝiĝo estis la uzo de sufiksa -i- por landaj nomoj, nefundamenta, kontraŭfundamenta por kelkaj, tute normala uzo por multaj, kaj komplete trotaksita en sia signifo por la strukturo de Esperanto. Zamenhof, „kiu la plej bone konas la lingvon", ne vidis problemojn proponi ĝin.

**Fundamenteco**

Etna lingvo ekestis en ia formo en tre fora tempo, per disbranĉiĝo el ekzistanta lingvo, per transformiĝo. La komenco de la afero ne postlasis restaĵojn elfoseblajn. Ĝi estas rezulto de longa tradicio kaj posedaĵo de sufiĉe granda lingvokomunumo. Tio garantias, ke ĉiu uzanto konas kaj kutimas uzi la komunan kodon, kaj tiu komuna enradikiĝinta konsento pri tiu kodo kaj la koncernaj reguloj garantias, ke ĉiu uzas ĝin plejeble same, kaj ke ĉiu ano de la lingvokomunumo komprenas, kion la alia intencas diri. Esperanto, precipe komence, ne konis tiun tradicion nek havis la grandan en si stabilan lingvokomunumon. Do stabileco instalita estas necesa por garantii la funkciadon de Esperanto en tia disa komunumo kun tiom da malsamaj fonoj de lingvo kaj kulturo. Tion ankaŭ sciis Zamenhof.

Oni ja bone konas la multajn memnomumitajn Et-Zamenhof-ojn, kiuj arogas al si „plibonigi" la lingvon. Por garantii iom da stabileco, precipe en la jaroj de pionireco, Zamenhof kunmetis kaj sekurigis la fundamentajn verkojn de la lingvo, kun fundamenta gramatiko, fundamenta vortaro, fundamenta ekzercaro kaj, ne apartenante al la Fundamento, la fundamentaj tekstoj. Li instigis la fruan lingvokomunumon ke ĝi firmigu kaj sankciu la Fundamenton por ke Esperanto ne dronu en diverseco, mortiga danĝero por la uztaŭgo de lingvo. La postuloj de tiu manifesto estas, ke oni ne ŝanĝu la fundamenton kaj ke tio, kio staras en la fundamentaj verkoj validas por la estonteco:

„4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon (...). Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj, donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto", ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboras por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton."

*El la „Bulonja Deklaro", 1905, laŭ L. L. Zamenhof, 1963 p. 37, citita el la enkonduko de la eldoninto, vd. la liston de literaturo.*

Tiu manifesto ne postulas, ke oni ne evoluigu la lingvon, kaj ke oni ne uzu por la lingvo elementojn, kiujn ne enhavas la Fundamento, sed, ke tio, kio staras en la fundamentaj verkoj, por ĉiam restu ero de korekta lingvouzo, ne pridubebla (ke Zamenhof sub certaj kondiĉoj eĉ permesis novan decidon por nova manifesto nur estu aludita ĉi tie, ĝis nun ne estis tiaspeca iniciativo kaj bezono). La fundamento, do, estas dokumento, kiu ekzempligas la veran bazon de la interna strukturo de la lingvo, la ostaron, ĉirkaŭ kiu kreskas, *laŭ ties antaŭkondiĉoj*, la karno de la lingvo. Oni ekzemple nur pensu pri la granda laboro kiun oni enmetis en la konstruon de la fakaj lingvoj, kio ja ne nur konsistas el la konstruo de amaso da novaj fakvortoj, sed ankaŭ en la konstruo kaj fikciigo de necesaj aldonaj fakaj afiksoj. Tiuj nepre devas malsimili al sufikso kiel -uj- (cigarujo, pomujo, Germanujo), ĉar ili devas esti tre precize difinitaj. Ili nepre devas disigi la diversajn signifojn de ĉiutaga vorto, kiu ofte sufiĉe klare difiniĝas per la lingva kaj situacia kunteksto, por ke ĉiu scienca uzanto havu tute precizan unusencan ideon, pri kio temas.

Ofte ankaŭ la uzanto de nescienca lingvo, ne nur poetoj kaj literaturproduktantoj de ĉiu speco, ne kontentas pri tro vastsignifa vorto kaj ŝatus havi vorton por esprimi iun nuancon de vorto, kiun eble la propra gepatra lingvo posedas, aŭ eĉ propra dialekto. Mi ekzemple uzas la vorton „olda" *apud* la vorto „maljuna", de kiuj la vorto „maljuna" estas la neutrala vorto por esprimi la ĝeneralan sencon „ne juna", dum „olda, oldulo" havas pli da koloro: „tiuj olduloj, mi oldulo". Tiu diferencigo per nova radiko estas tute normala kaj necesa ero de ĉiu lingvo kaj nepre necese ankaŭ por Esperanto, se ĝi, do, volas esti tutplene taŭga komunikilo. Por atingi la samon per bazaj rimedoj, mi devus fari monstron de vortkunmetado aŭ priskriban frazon, kiu farus la lingvon peza kaj komplika, kaj eble tamen ne trafus mian intencon. Kompreneble, la uzo de tiaj rimedoj postulas sufiĉe da responsemo, kaj malantaŭe staras ĉiam la lingva komunumo, kiu akceptas aŭ forĵetas, kaj la Akademio, kiu konsilas, rekomendas, sankcias (i.a. per oficialigo). Rigoristoj simple pensu pri la signifo de la vorto „fundamento". Ĉiu domo bezonas, por firme stari, fundamenton, neniu tamen postulus, ke oni de domoj nur konstruu la fundementojn, la domo finfine estas la vera celo de konstruado. Jen Zamenhof:

„La netuŝebleco de la Fundamento ne en senco de *fetiĉismo*, kiel malvere diras niaj kontraŭuloj, sed en senco de malpermeso de *rompado* ... estas la

plej necesa rimedo por ke ... la novaj esperantistoj bonege komprenu la malnovajn esperantistojn kaj la malnovajn verkojn, t.e. por ke nia lingvo ĉiam konservu severan *unuecon,* kiu por lingvo estas multe pli necesa, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco.“
*Waringhien (1962) p. 113 sekv. (al Lingva Komitato 1907)*
„ ... kun la *Fundamento* ni devas esti tre singardaj; ĉar se ni ĝin rompos sen ia *tre grava* bezono kaj sen KOMUNA INTERKONSENTO; tiam la tuta lingvo ruiniĝos.“
*Waringhien (1962) p. 114. (Let al Bourlet 1911)*
„Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la „Fundamento de Esperanto“ scias tre bone, ke ĝi ne sole ne reprezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun nenia alia lingvo iam posedis eĉ parte ...“
*Waringhien (1962) p. 115 (Cirkulera Letero al ĉiuj esperantistoj, 1908)*
Feliĉe, ĝis nun mi ne trovis Esperantiston, por kies pens- kaj komunikadkapablo sufiĉus la Fundamento sola, eĉ ne inter la „fundamentistoj“.

**Nefundamenteco**
Nefundamenteco, uzo de lingva ero, kiun oni ne trovas en la fundamentaj verkoj aŭ pli malvaste, kiu ne estas trovebla en la Fundamento de Esperanto, estas ĉiutaga pano de ĉiu parolanto de la kara lingvo. Ankaŭ la lingvouzo de la unua parolanto kaj „iniciatoro“ de la lingvo plenas je vortoj, kiujn vi ne trovos en la Fundamento. La komenca Esperanto estis jam riĉa sed tute ne kompleta, la tujan uzeblecon subtenis la sistemo de kunmetado de ekzistantaj vortoj („radikoj“, „afiksoj“, „finaĵoj“ ) por nuancigo de signifoj aŭ por formado de novaj signifoj. Sed ĉiu lingvo evoluas, devas evolui kun la socio kaj kun la esprimbezonoj de la uzantoj, kompreneble Esperanto devas obei al la sama leĝo aŭ ĝi perdos sian karakteron kiel plenvalora komunikilo. La kunmetado havas naturan limon. Eĉ longegaj vortmonstroj ne povas trovi ĉiun signifon kaj ĉiun nuancon kaj ili iam faros la elegantan lingvon peza kaj neuzebla. Novaj radikoj estas neeviteblaj, kaj Esperanto havas la avantaĝon, ke ĝi povas elekti la plej taŭgajn, bone elprovitajn el la internacia lingvaro. Spite al tio, ke Zamenhof tion rekomendis, kaj por sekurigi la laŭsisteman konformecon donis regulojn por tia faro, la lingva rigorismo de certaj fundamentistoj ne volas tion permesi, unuflanke batalante kontraŭ neologismoj, aliflanke kontraŭ vortoj, kiuj havas por nia ĝenerala kompreno de la lingvo gramatikan karakteron. Lingvo normale pli facile kaj sen granda damaĝo toleras neologismojn ol strukturajn deflankiĝojn. La angla lingvo estas karakterize angla spite al tio, ke ĝi plenas je vortoj ne originaj en la lingvo, sed adaptitaj al la buŝo de la Anglo, tiel, ke tiaj vortoj superas nombre la vortojn origine anglosaksajn. Tamen dum longa tempo ili sentiĝas fremdaj, iom malagrablaj kaj ili kaŭzas malcertecon pri prononco kaj skribo. Ni ja konas tiujn problemojn en nia germana lingvo. Esperanto konsistas plene el tiaj vortoj, sed Esperanto havas rimedojn tuj ilin adapti al la tutsistemo de la lingvo kaj al la postulo, ke oni uzu ilin laŭ la klara sistemo de la lingvo. La ebleco fari novajn signifojn per kunmetado de konataj signifoj estas avantaĝo por lingvouzantoj kaj same por lernantoj, tion tre bone ja spertas uzantoj de la germana lingvo. Eĉ dum la parolado mi povas konstrui signifon per kunmetado, kiun mi antaŭe neniam uzis, kaj la alia povas spontanee kompreni, kion mi volas diri. Tiun eblecon ni konservu en nia germana lingvo kaj en la universala lingvo. Sed je iu punkto tiu rimedo perdas sian valoron per trokonstruo. Tiam la afero fariĝas komplikiga kaj por nespertaj uzantoj ĝena kaj malhelpa, la lingvo fariĝas peza, maleleganta, la avantaĝo por la lernantoj fariĝas malhelpa, precipe por homoj, kiuj en la propra lingvo ne tiel facile uzas tiun rimedon. Estas necese, ke oni uzu tutan frazon aŭ frazeron, kion vi kompare ofte trovas ekzemple en la franca kompare al la germana, kiu multe pli kunmetas. La Angloj preferis la metodon trovi novan radikon, en etnaj lingvoj. Esperanto kapablas plej facile uzi ĉiujn rimedojn, kaj *oni uzu ilin responseme por la plej bona rezulto en komunumo konsistanta el tiom da uzantoj de malsamaj gepatraj lingvoj.* Jen Zamenhof:
„La vorto 'bezonest' estis kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute mi konsilus pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili estas ne kunligitaj, sed uzataj aparte.“
*Waringhien (1962) p. 4 (La Esperantisto 1891)*
Kaj jen la praktiko:
„Statistische Untersuchungen an Esperanto-Texten belegen, dass die zweigliedrige Verbindung (Stammwort plus Endung) dennoch den Standard darstellt, und dass die statistisch noch relevante Obergrenze der Anreihung von Bildungselementen bei vier Elementen liegt.“
Willkommen (2001 p. 31, bazo: Gledhill 1998 p. 35)
Por ĉion tion observi ekzistas la Akademio de Esperanto, sed la plej potenca akademio estas la lingvokomunumo mem por *ĉiu* lingvo, kaj Zamenhof bone sciis tion kaj esprimis tion, longe antaŭ ol, ke tiu ekkono fariĝis komuna sciaĵo de la lingvoscienco. Se plej eble multaj lingvouzantoj komprenas kaj uzas esprimon unusence, tiam ĝi enradikiĝis kaj fariĝis ero de la lingvo necesa kaj apenaŭ forigebla. Nefundamenteco, do, ne estas kriterio por malpermesoj koncerne la lingvouzon, se oni ne eltrovas tute arbitre laŭ persona gusto. Tian arbitraĵon la lingvokomunumo tre verŝajne elĵetos per simpla neglekto.

**Kontraŭfundamenteco**
Se mi forĵetas, ŝanĝas estantan eron de la fundamentaj reguloj, malpermesas la uzon de fundmentaj reguloj, nur tiam mi kulpas pri kontraŭfundamenteco, tio estas fakte peko kontraŭ la lingvo kaj peko kontraŭ la lingvokomunumo, en ekstremo tio kaŭzus lingvan anarkion, endanĝerigus la lingvon mem, la universalecon de la lingvo, tio disigus la komunumon uzantan la saman lingvon, neniigus la lingvon. La

uzo de -i- por geografiaj nomoj tion ne faras, tio estas tute normala kaj sub certaj kondiĉoj tute permesebla, se ne necesa afero. Se vi diras, ke oni ne rajtas uzi -uj- laŭ la fundamento, aŭ se vi uzas aŭ preskribas -al- anstataŭe, tio estas kontraŭfundamenta. Do, se vi volas uzi -uj- laŭ la fundamenta uzo, neniu povas malpermesi tion aŭ diri, ke via uzo estas malĝusta.

**Finfine: -i-**

La uzo de -i- por landaj nomoj estas intertempe ĉiutagaĵo en Esperanto; la granda majstro, la lingvokomunumo, decidis plejgrandparte. Ĉiu sperta uzanto konas kaj komprenas ĝin senprobleme, eĉ ĝiaj malamikoj. Sed pro kio, diable, oni bezonas ĝin, se -uj- estas samkapabla? Laŭ mi ĝi pekas kontraŭ la lingvosento, la diferencigemo de plej multaj uzantoj de Esperanto. La kunmetado de la signifoj: kvazaŭ skatolo, arbo kaj lando estas tro vasta. Tio verŝajne estas tro abstraktiga por ĉiutaga lingvouzo de ĉiuhomo. Mi ekzemple neniam uzas la vorton pomujo, sed preferas pomarbo. Ĉe la landaj nomoj mi estas malpli sentema, mi uzas ambaŭ kun pli da prefero por -i-. Tutcerte ankaŭ la influo de la etnaj lingvoj, kiuj en abstraktita formo ja dekomence ludas tian grandan de Zamenhof intencitan rolon (li ja konstruis sian lingvon laŭ ilia modelo, prenis preskaŭ la tutan vortaron el etnaj lingvoj).

La paraleligo de geografia -i- kun la verbomarkigo -i, kiel iu asertis, neniel eblas. Ili ne estas interŝanĝeblaj kaj ne miskompreneblaj. Post -i ne povas stari io ajn en la sama vorto, dum -i- ĉiam postulas markigon post si. Tio signifas ankaŭ, ke -i- neniam staras vortfine, minimume ĝi havas apostrofon post si; -i staras ĉiam vortofine. Pro la reguleco de Esperanto tio aŭtomate stiras malsaman akcenton: -i- estas ĉiam akcentita, -i neniam. Tiuj estas tute klaraj kriterioj en lingvistiko kaj ankaŭ en praktiko. Neniam dum praktika komunikado tiu ŝajna sameco kaŭzas problemon. Sed neniu pli surdas ol tiu, kiu ne *volas* aŭdi, skribis Delfi Dalmau, kataluna Esperantisto.

**Zamenhof: jes, Akademio: ne**

Zamenhof argumentas uzante etnajn lingvojn koncerne sian proponon de -i-:

„Ni povus diri 'Brazilio', Ĉilio“ k.t.p., tamen mi ne konsilus tion fari, parte pro tio, ke por la slavoj kaj germanoj, kiuj alkutimiĝis al 'Brazil*i*a', 'Brazil*i*en', 'Ĉil*i*ec', la vortoj 'Brazilo', 'Ĉilo' ĉiam sonus kiel nomoj de *popoloj*, parte pro tio, ke la longatempe uzitaj formoj 'Brazilo', 'Ĉilo' en la senco de *popolo* donus nun grandan konfuzon, se la samajn formojn ni uzus nun en senco de *lando*. Sed tute oportune eviti samtempe ĉiujn tri malbonaĵojn (t.e. eraron, kontraŭkutimecon kaj konfuzon) ni povas tre bone, se ni de nun uzados por la por la diritaj landoj la formojn 'Brazilio', 'Ĉilio'; kaj tiel mi konsilas agi. Tiel ni neniam devas diri 'Meksikujo'; ni devus diri 'Meksiko', sed por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj similcirkonstancaj landoj, t.e. nomi la urbon 'Meksiko' kaj la landon 'Meksikio' ...“ *Lingvaj Respondoj 18 B, Waringhien (1962) p.15*

La Akademio ne konfirmis tion. Konsultante la centrajn vortarojn oni trovas en PIV (1970) „Meksiko“ (z) por la urbo kaj „Meksikio“ (z) por la lando, en NPIV (2002) „Meksiko (oficiala aldono 8). C-Amerika regno. Meksikio (z) = -o.“, Vidu ankaŭ la klarigojn pri nomoj de teritorioj sur p. 23 de NPIV. Koncerne „Brazilo“, „Brazilio“ (tiel jam rimarkas noto sub supra artikolo en LR) la uzo ja fariĝis alia: Brazilio, la urbo; Brazilo, la lando.

Aldoniĝas por marki tian teritorion krome ja ankaŭ la vorto -lando, kiun Zamenhof „permesas“ libere uzi, ekz. Franclando *(Waringhien [1962] p. 14.).* Kaj ekzistas landoj, kiel Kanado, Usono, kiuj tute ne estas karakterizitaj kiel landoj per iu ajn „sufikso“. Do, oni ne povas diri, ke -uj- estas *la* rimedo por marki landan nomon, kiel ekzemple -o, kaj nur -o, markas la substantivon.

Mi opinias, ke tiu problemo apartenas videble al la kategorio „vortkunmetado“ (pro tio en mia gramatiko, laŭ la kompreno de Zamenhof kaj laŭ analizo, la uzo de „Bildungswörter“ por la „afiksoj“), ne al la kategorio „gramatikaĵo“ en senco malvasta, kaj la vortkunmetado ja estas libera, laŭ ĉies emo, esprimbezono – kaj laŭ la logiko, do, ke la kunmetado donu sencon. Oni ne rajtas forigi -uj-, ĉar ĝi estas fundamenta, sed oni rajtas uzi pli malvastsencan (afiks)vorton, kiu pli unusence precizigas la lingvon. Do, se la lingvokomunumo akceptas ĝin, ĝi estas ero de la lingvo, se la Akademio ĝin sankcias, ĝi estas oficiala.

Malforteco de -uj- estas aldone, ke ĝi ja estas difinita per „io, kio entenas ion nomitan“, kio samtempe postulas, ke tiu enhavo estas unuspeca. Cigarujo enhavas cigarojn, pomujo enhavas (?) pomojn, Germanujo enhavas Germanojn. Pro alia kaŭzo tio jam estis problema en la tempo de Zamenhof, ĉar preskaŭ neniu lando estas unugenta. Kaj Zamenhof bone sciis tion, parolante pri la „ĉefgento“ aŭ „gvida gento“. Intertempe oni multe pli atentis pri la imperiismeca penso malantaŭ tio. En Germanio ja vivas ankaŭ Danoj, Frisoj, Soraboj, Poloj, Sintioj kaj Romaoj kiel aŭtoĥtonoj, kompare de pli da ili en la tempo de Zamenhof. La uzo de -uj- estas fakte diskriminiga negante ĉiujn tiujn, dum -i-, kiel geografia konstruvorto estas tiukoncerne neŭtrala. *Ĝuste pro tiu kazo Zamenhof rekomendis -i-*, unue por la „novaj landoj“ (ekzemple en Ameriko).

La ŝtatonformanta parto de Eŭropo en kiu mi vivas, simple havas la nomon Germanio, ĉu en ĝi vivas germanoj aŭ ne. La homoj de la nordeŭropaj landoj ŝatas -i- por esprimi trafe kaj mallonge la specialan unuon, kiun ili sentas kaj kiu ankaŭ ekzistas per organizaj institucioj: „Nordio“. Por tion esprimi -uj- pro ĝia strikta difino ne taŭgas (ne ekzistas „nordoj“ kiel gento). Ke oni jam uzas -i- metafore nur montras kiel ĝi enradikiĝis kaj fariĝis regulige produktiva, tute ne kontraŭstrukture. Por „Ŝengenio“ oni devus danki al la unua uzant(in)o kaj al -i-, ĉar tio kune kun „Nordio“ kaj „Esperantio“ fakte pliriĉigas nian lingvon en bela tradicia sistema maniero. Ĉiu spontanee komprenas tiajn esprimojn.

La signifo de -i- estas por neniu duba, ĝi estas akceptita de la granda amaso de la lingvokomunumo, la granda su-

vereno koncerne tiajn evoluojn lingvajn. Mi ne vidas kaŭzojn por malpermeso de -i-, sed jes mi vidas kaŭzojn por ĝia uzo kaj oficialigo:
„2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo [fundamenta, aŭt.] en nia lingvo estas *tro neoportuna,* ĝi ne devos *forigi* aŭ *ŝanĝi* la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova, Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arkaismo*, kiel ni tion vidas en ĉiu natura lingvo.“
L. L. Zamenhof (1963) p. 48

**Literaturindikoj**
Christopher Gledhill, *The Grammar of Esperanto*. A corpus-based description. München: Lincom Europa 1998
*La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda 2002 (NPIV)
*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda 1970 (PIV)
Dirk Willkommen, *Esperanto-Grammatik*. Eine Lerner- und Referenzgrammatik. Hamburg: Helmut Buske Verlag 2001
D-ro L. L. Zamenhof, *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto.* (17a eldono) Rickmansworth 1954 (foto-represo 1969)
Doktoro L. L. Zamenhof, *Lingvaj Respondoj*, Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto (sesa eldono), editoris Gaston Waringhien. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj 1962 (Waringhien)
L. L. Zamenhof, *Fundamento de Esperanto*. Naŭa eldono kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albault. Marmande 1963 (Fundamento)

## Naŭa Oficiala Aldono
al la Universala Vortaro

La Akademio de Esperanto laboras de Decembro 2003 pri oficialigado de vortoj en la Naŭa Oficiala Aldono (9OA). En Aŭgusto 2006 la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro finis sian laboron pri 9OA per Sekcia voĉdonado, kiu rezultigis Raporton, kiu nun kuŝas ĉe la Estraro de la Akademio. Pri tiu Raporto diskutos la Pleno, kaj poste sekvos laŭplane tut-akademia voĉdonado.
Kiam la Akademio oficialigas radikon, tio formale signifas, ke ĝi aldonas tiun radikon al la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento de Esperanto. Tio tamen ne signifas, ke la radiko fariĝas Fundamenta, ĉar Fundamentaj estas nur tiuj elementoj, kiuj troviĝas en la origina netuŝebla Fundamento. Praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo. Devige gvidi la lingvouzon la Akademio nek povas, nek volas, sed ĝi esperas, ke ĝiajn rekomendojn la uzantoj de la lingvo atentos kaj trovos utilaj.
En antaŭaj Oficialaj Aldonoj la radikoj kaj vortoj estis klarigitaj precipe per tradukoj en naciajn lingvojn, ĉefe en la kvin naciajn lingvojn de la Fundamento, sed ankaŭ en aliajn lingvojn. Sed oni uzis ankaŭ difinojn en Esperanto, precipe en la Aldonoj Sepa kaj Oka. En la projekto de 9OA uziĝas nur difinoj en Esperanto sen tradukoj naci-lingvaj. Multajn el la difinoj akompanas helpaj ekzemploj.
En la nun proponata Raporto pri Naŭa Oficiala Aldono la jenaj 209 vortoj kandidatas por oficialigo:
adrenalino, agresi, aidoso, akupunkturo, alergio, algoritmo, amebo, amendi, anĉo, Antarkto, antibiotiko, anuso, aperitivo, areo, Arkto, asbesto, aspirino, avokado, bankedo, baskulo, beletro, bemolo, betono, bito, bizono, blufi, boaco, bradipo, brito, brokolo, burokrato, cico, cirkumcidi, ĉampiono, ĉasio, ĉimpanzo, ĉino, defii, delto, demografio, detektivo, dieso, diskriminacii, dizerti, drasta, drivi, ekologio, etikedo, etno, etnologio, etoso, eufemismo, eukalipto, eŭro, farĉo, feki, festivalo, folkloro, foto, framo, frustri, furzi, galaksio, geno, genro, giĉeto, glisi, grafiko, gujavo, hormono, ideologio, ikso, inflacio, insulino, ipsilono, Israelo, japano, ĵazo, ĵokeo, ĵudo, kalcio, kampanjo, kancero, kanguruo, kapsiko, karoserio, kasedo, katapulto, kibuco, kimono, kiosko, klitoro, klono, kodo, kodekso, kohera, komenti, kompakta, komputi, kondomo, konekti, kooperativo, kramfo, kromosomo, kuo, kurzo, kvakero, kvorumo, lanĉi, lasero, leŭkemio, limfo, magnetofono, majonezo, majusklo, mandarino, mango, manioko, mateo, matrico, melongeno, menstrui, mesaĝo, minusklo, miraĝo, modemo, muldi, nano, omaĝo, organika, orgasmo, pankreato, papriko, pavilono, penicilino, peniso, periskopo, persvadi, petalo, pico, piĵamo, pikniko, pingveno, pisi, poleno, polpo, prestiĝo, prostato, proteino, pubo, pulpo, pundo, radaro, radiografi, rakedo, reĝisoro, rezolucio, roboto, ronĝi, rotacii, ruleto, saksofono, salikoko, satelito, sesio, silicio, skani, skeĉo, skolto, specifi, spekti, stabila, stagni, statuto, stereofonio, stiri, stoko, strangoli, sugesti, ŝalti, ŝenoprazo, ŝoki, ŝtormo, taksio, tanko, tapiro, telepatio, teniso, testo, tonsilo, torturi, transistoro, treti, tribo, tukano, tumoro, unio, Usono, vagino, vakuo, valuto, vando, versio, virtuala, viruso, vitamino, vodko, vulvo, zipo.
En la Sekcia voĉdonado pri la projekto de 9OA partoprenis 20 el la 32 Sekcianoj. 1 vorto ricevis 16 jesojn. 10 vortoj ricevis po 17 jesojn. 53 vortoj ricevis po 18 jesojn. La ceteraj ricevis po 19 jesojn. Unu Sekciano voĉdonis sindetene pri ĉiuj vortoj. Sekciaj voĉdonadoj estas libervolaj kaj ili ne estas regulitaj de la Akademia Statuto. Ili servas nur por prepari Raporton al la Pleno, kiu poste faras la efektivan decidon laŭ la Statutaj reguloj. La ĉi-antaŭaj vortoj do ankoraŭ ne estas oficialigitaj. Ili fariĝos tiaj nur se ili estos aprobitaj en la preparata tut-Akademia voĉdonado.
Detalaj informoj pri jam oficialigitaj radikoj troviĝas en la TTT-ejo de la Akademio: http://akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/, http://akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/klarigoj.html#klarigoj
La estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la direktoro de la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Bertilo Wennergren.

*Oficialaj informoj*
*n-ro 3*
*2006.10.07*
*laŭ Ret-info*